

M. 15121: 1.

(översättn. 1 sida)

Holland

uppt. år 1952

Svar på LLF 85 rör. hästkött och hästslakt m. m.

s. 1.

F Ofte bestkuracistoj mortigas siajn bestojn per injekto.

Holland

Sciencia Revuo

M. 15121:1.

FOLKLIVSARKIVET

Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

REDAKCIO: W. P. ROELOFS - KERKPAD 22 53 - SOEST - NEDERLANDO
ADMINISTRACIO: J. MÜSSES - ELDONISTO - PÜRMEREND - NEDERLANDO

Soest, 29 - III - 1952.

Al la Universitato de Lund, Etnologia arkivo.

Mi ricevis peton de la Sveda Esperanto-Federacio publikigi en Sciencia Revuo vian enketon. Volonte mi tion faros. Cetere jam nun mi povas doni informojn pri Nederlando.

1. Tiuj kiuj estas kompetentaj juĝas ke viando ĉevala ne estas pli bona, aŭ pli malbona kiel homa nutraĵo, ol ekzemple bova aŭ ŝafa viando. Tamen ĉevalojn oni ne bredas kiel buĉobestojn, kaj tial ĉevala viando estas io escepta. Ĉevalon oni buĉas nur ĉu pro tio ke ĝi havis akcidenton, ekzemple rompisan kruron, aŭ pro tio ke ĝi tro maljuniĝis por ankoraŭ labori. En la lasta kazo la viando eble el vidpunkto de la konsumanto ne estas u kvalita. Certe estas ke, almenaŭ en pli fruaj jaroj, multaj havis antaŭjuĝojn kontraŭ viando ĉevala, kiu ĝenerale estis kaj certe ankoraŭ estas malpli multekosta ol, ni diru, bova viando, kaj kiu ĝenerale estis, almenaŭ en la grandaj urboj, vendata en apartaj butikoj. Verŝajne la antaŭjuĝo de malpliboneco ja devenis de tio: ĉevala viando estas io malpli multekosta ol bova viando, aĉetas ĝin la malriĉuloj, do ĝi estas malpli bona ja la pli bonhavaj anoj de la socio ne manĝas ĝin, *escepte kie kuracisto speciale* (Bonvolu noti ke via raportanto estas vegetarano). *Rekomendis ĝin.*
2. Se ĉevaloj estas mortigataj aŭ buĉataj, tion faras la samaj homoj kiuj ankaŭ buĉas bovojn, k.t.p. Hundojn kaj katojn oni mortigas aŭ en la asilo kaj por bestoj, aŭ, en lokoj kie tiaj ne ekzistas, en la komunuma buĉejo, aŭ en speciala gaskesto ĉe la gasfabrikejo. La kadavrojn oni detruas. Tia mortigado neniel malhonorigas la plenumistojn. *F (vidu supre)*
3. Sed ankaŭ ekzistas uloj kiuj klopodas kapti katojn (kaj kredeble ankaŭ hundojn); ili mortigas la bestojn. La kataj feloj liveras malmultekostan "peltaĵon", la ceteron oni provas vendi kiel "leporon". Tial oni ĉe ni ofte ŝerce indikas la katon per la vorto "dakhaas" (t.e. tegmenta leporo). Konpreneble tia agado okazas ŝtele kaj kontraŭleĝe. La nekonatoj kiuj tion faras certe ne povas fanfaroni pri la publika simpatio. Oni parolas pri tiu kiel pri "kattenmepper" (proksimume: katobatistoj). Ŝajnas ke en Gelderland (en ties norda parto, nomata Veluwe) ankoraŭ okazas kontraŭleĝa buĉado de hundoj. *aŭ per injekto de bestkuracisto*
4. Buĉado de ĉevaloj kompreneble okazas en la sama maniero, en kiu oni buĉas ankaŭ aliajn bestojn. La mortigado de dombestoj (katoj, hundoj) okazas diversmaniere, laŭ la cirkonstancoj: per ordinara lungaso. En multaj asiloj oni nun mortigas hundojn elektre. Se oni mortigas tiajn bestojn en buĉejoj oni sendube uzas aliajn metodojn, por hundoj kredeble oni uzas malgrandan "pafmaskon". La Nederlanda Societo por Protektado de Bestoj rekomendas mortigi ĵus naskitajn hundidojn kaj katidojn per dronigo en varmeta akvo.

Miajn informojn mi grandparte ricevis de s-ro T. Sigling, bestkuracisto en Amsterdam, kiu dum multaj jaroj aktivis en la N.S.p P.d.B.

W. P. Roelofs

6

Jag har blivit ombedd av Svenska Esperantoförbundet att publicera Eder rundskrivelse i SCIENCA REVUO. Detta skall jag gärna göra. För övrigt kan jag redan nu lämna upplysningar för Nederländernas del.

1. Fackmännen anser att hästkött varken är bättre eller sämre till människoföda än ex. oxkött eller fårkött. Man uppföder emellertid ej hästar som slaktdjur, och därför är hästköttet något av en undantagsvara. En häst slaktar man endast antingen därför att den råkat ut för en olycka, ex. brutit ett ben, eller därför att den blivit för gammal till att arbeta. I sistnämnda fallet är köttet kanske ur konsumentsynpunkt inte så förstklassigt. Säkert är att, åtminstone tidigare, många har haft fördomar emot hästkött, som i allmänhet varit och säkerligen ännu är billigare än, låt oss säga, oxkött, och som vanligen salufördes i särskilda butiker, åtminstone i de större städerna. Troligtvis kommer väl föreställningen om undermålighet av detta: hästkött är något som är billigare än oxkött, det är de fattiga som köper sådant, alltså är det sämre, de mera välsituerade samhällsmedlemmarna äter det ju inte, förutom på särskild rekommendation av läkare. (Anmärkas bör att rapportören är vegetarian.)
- 2 & 3. Om hästar skall dödas eller slaktas, så utföres detta av de samma som slaktar oxar osv. Hundar och katter dödar man antingen i "djur-asylerna", eller på platser där dylika inte finns, i det kommunala slakthuset, eller i en speciell gasbur vid gasverket. Kropparna förstöres. Ett sådant avlivande vanarar på intet sätt dem som utfört det. (Ofta dödar veterinärer sådana djur genom injektion.) Men det finns även folk som går in för att fånga katter (och troligtvis även hundar); dessa dödar djuren. Katthudarna ger ett billigt pälsverk, det övriga försöker man sälja som "hare". Därför anger man hos oss ofta katten med ordet "dakhaas" (dvs tak-hare). Naturligtvis bedrives sådana affärer i smyg olagligen. De okända som gör detta kan säkert inte skryta med det allmännas sympati. Man talar om dem som "kattenmeppers" (ung. katt-piskare). I Gelderland (i dess norra del kallad Veluwe) tycks det ännu förekomma olaglig slaktning av hunder.
4. Slaktning av hästar försiggår givetvis på samma sätt som man slaktar andra djur. Dödandet av husdjur (katter, hundar) försiggår på olika sätt allt efter omständigheterna: med vanlig lysgas. I många asyler dödar man numera hundarna på elektrisk väg eller medelst injektion av veterinär. Om man dödar sådana djur på slakthus användes otvivelaktigt andra metoder, betr. hundar användes troligtvis en liten "skjutmask". Nederländska Djurskyddssällskapet rekommenderar att nyfödda valpar och kattungar ävlivas medelst dränkning i ljumt vatten.

Upplysningarna har jag till stor del fått från Herr T. Sigling, veterinär i Amsterdam, vilken under många år varit aktiv i Nederländska Djurskyddssällskapet.

W.P. ROELOFS

LEK/TB